

TO OFFER KNOWLEDGE OF THE AUXILIARY WORLD LANGUAGE
THAT BARRIERS TO FRIENDSHIP BETWEEN NATIONS BE REMOVED

THE NORTH AMERICAN ★ ESPERANTO

ESPERANTO CLEARING HOUSE
OF WORLD LITERATURE AND
SCIENTIFIC RESEARCH

REVIEW

ESPERANTO ESTAS SIMPLA
FACILE LERNEBLA LINGVO
POR LA TUTA MONDO

Vol. I

August, 1953

No. 3

OUR FIRST CONGRESS

The first annual Congress of the Esperanto League for North America is now history. Enthusiastic members of the League, determined to make the new organization's first nation-wide meeting a big success, convened in Madison, Wisconsin, on July 2, 1953, from every corner of the United States and from two Canadian provinces. The Congress was characterized by complete harmony, cooperation, and an infectious enthusiasm which captured the attention of Wisconsin's capitol city. In spite of the fact that ELNA only came into being less than a year ago, the Congress was one of the largest North American gatherings of its kind in recent years with a total of 32 delegates in attendance. Seven others had signed up as Congress members, but were unable to attend.

Thursday, July 2

The Interkonatiga Vespero, held in the Colonial room of the Loraine hotel at 8 o'clock, was the first indication of the very pleasurable and productive time ahead. Many delegates were able to meet for the first time other members previously known to them only by correspondence, also to renew old acquaintances and to make new friends. The warm spirit of fellowship which attends every large gathering of Esperantists sincerely dedicated to the furtherance of Nia Afero was once again in evidence.

Friday, July 3

The Congress program called for two business meetings — one in the morning and another in the afternoon — and a public meeting at 8 in the evening. The first business meeting was called to order by President Gilbert Nickel after the Congress group was snapped in the lobby of the hotel by news photographers. A Resolution Committee was appointed, including John Carpenter, Roland Barta, and Miss Roan



Orloff. Armin Doneis, Ray Pease, and John McNaughton were named to the Amendments Committee. Congratulatory telegrams and letters from well-wishers were read, after which President Nickel delivered his report to the Congress. Mr. Nickel emphasized the point that this organization stands for control by the grass roots of the organization; that there was to be a minimum of control by the Central Office, but that the rank and file would prevail. Democracy was to be our watchword. To effect this, committees were to call upon other members for assistance, whenever such additional help was found necessary. In this way, work would be spread out, involving more of the membership, and thus keeping enthusiasm for Esperanto alive. So far as other organizations were concerned, a strict neutrality was to be observed,

although assistance would be given to other groups, in order that Esperanto be aided. Regional groups were not to be dominated by the League, merely guided when called upon to assist.

The report of the Executive Committee was submitted in typewritten form, and appears elsewhere in this issue of the Review.

The report of the General Secretary was read by S-ano Gilbert while S-ano Dormont, together with S-anoj Sayers and Lewin, were being interviewed by the representatives of radio station WHA. A recording of the interview was made and broadcast over a network of nine midwestern stations the following Thursday. The interview was subsequently rebroadcast on WMFM, Madison, on the regular program "Esperanto Now," conducted by S-ano Glenn Turner.

(Continued on page 2)

**THE NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW**

Official Organ

of the
ESPERANTO LEAGUE

for

NORTH AMERICA

Editor

DAVID B. RICHARDSON

6205 South Prospect
Tacoma, Wash.

OFFICERS OF ELNA

President

GILBERT NICKEL

204 Harding Avenue
Silver, Del., No. 4

Vice-President

JOHN L. LEWINE

52 Riverside Drive
New York 4, N. Y.

Secretary-Treasurer

LOUIS DORMONT

123 East 35th Street
Brooklyn 3, N. Y.
Tel. BU. 4-0963

(Continued from page 1)

The reports of other officers of the League were read, and showed that the financial situation of the League is satisfactory, considering the difficulties experienced with organizational problems in the early months. A satisfactory balance in the bank will ensure continued appearance of the Review.

It was also reported that the membership of the League has now passed the 150 mark.

The public meeting proved to be even more interesting than the most optimistic members had expected. Several persons recounted their experiences in accordance with the subject announced for the evening: "How Esperanto can be used for practical purposes." The audience was especially interested in the account by Miss Orloff of an instance in which Esperanto was instrumental in the successful treatment of an ailing baby in South America. The doctor, who received details of the illness through an Esperantist intermediary and prescribed treatment in the same manner, is an acquaintance of Miss Orloff. A question and answer period following the talks brought forth many questions and comments from the audience.

Saturday, July 4

Two more business meetings produced the following actions:

The resignation of S-ano Sayers as editor of the **Esperanto Review** was accepted with regret.

Joseph Leahy and Mr. Perry Eakin were made life members, the former in return for his untiring efforts in keeping Esperanto alive in North America during the trying days of the depression, the latter in acknowledgment of his generous contribution to the treasury of the League.

The report of the Resolutions Committee was received and accepted. These resolutions were:

(a) A vote of thanks to Glenn P. Turner, head of the Local Congress Committee, for his successful efforts in connection with the arrangements on behalf of the Congress location and arrangements, and newspaper and radio publicity. The Secretary was instructed to write letters of appreciation to the various persons concerned, thanking them for their assistance and courtesy.

(b) S-ano Sayers was thanked for his untiring efforts on behalf of the League. Regret was expressed at his relinquishing the post of editor and hope for success in future activities was expressed.

(c) Sympathy was extended to Howard Latham, who because of ill health was obliged to relinquish his post as Treasurer.

(d) Miss Emma Jungton was unanimously elected as representative of the League at the forthcoming International Congress of U.E.A. in Zagreb. A letter to that effect was sent by the Secretary to the LKK at Zagreb.

(e) All decisions of this Congress shall be published to the membership; and, if 25 or more members protest within 60 days thereafter, shall be submitted to the membership for vote.

(f) It was agreed that the aims of universal teaching of Esperanto in the schools of all nations, as advocated by the petition now in the hands of UNESCO are heartily approved by this League.

The report of the Amendments Committee was received and accepted. It was decided to send the proposed amendments to the membership for action by them. The proposed amendments will also be found elsewhere in this issue of the **Review**.

Saturday afternoon the Congress adjourned from business matters to take a sight-seeing trip by bus around Madison and the lakes. Afterward, the entire Congress was entertained for supper at the picturesque country home of Mr. and Mrs. Glenn Turner. Mrs. Nieland, Mrs. Marootian and others entertained with instrumental and vocal music.

Sunday, July 5

Two special Sunday services were held in the modernistic Unitarian Meeting House — the first was conducted by S-ano Sayers in English, and the second conducted in Esperanto by S-ano Lewine. The Congress photo was made at the Meeting House which, delegates were interested to learn, was built largely with money contributed by Dr. Charles A. Vilas, Secretary of the Wisconsin State Esperanto Association in 1904

A noon meeting for dinner at the Meeting House completed activities of the Congress. Before closing the Congress, delegates tentatively decided to hold next year's Congress either in Sacramento or in Denver.

Those attending the Congress were: R. M. Pease, Louis Dormont, Roan U. Orloff, Ferd Carlson, Mr. and Mrs. James D. Sayers, Mr. and Mrs. Gilbert Nickel, Mr. and Mrs. Glenn P. Turner, B. L. Hanson, Joseph J. Williams, Jouns Dagys, Roland Barta, Joseph Leahy, Mr. and Mrs. John McNaughton, John L. Lewine, Erick Kovel, Albert Whitworth, Mr. and Mrs. J. E. Carpenter, Mr. and Mrs. Armin Doneis, Mollie B. Nieland, Johano Jungton, Dr. Sefan Chobanoff, Thomas A. Goldman, Tennis Burick, Susan and George Sellery. Others who paid their Congress fee but were unable to attend were: Helene Wolff, Conrad Fisher, E. C. Pollock, George E. Wagner, John Bovit, Frank W. Vedder, Cecelia P. Thomas.

El "Heroldo de Esperanto"

Refoje la ovo de Kolumbo:

Anglaj vortoj kaj rusa alfabeto donos idealan mondlingvon.

Cu vi ne kredas tion, kara leganto? Sub la titolo: „Cu konkero de Babelo? Anglaj vortoj, rusa alfabeto povas fari mondlingvon,” iu Mario A. Pei publikigis en „The New York Times” de 24.5.1953 artikolon, en kiu li serioze proponas uzi la anglan lingvon, skribitan per cirila alfabeto, por fari ĝin pli akceptebla por rusoj kiel la mondlingvo. Interesa estas lia opinio, ke ĉe tia kompromiso oni devus fari kelkajn esencajn modifojn... ne ĉe la angla lingvo sed ĉe la cirila alfabeto!

La aŭtoro mencias ankaŭ „konstruitajn lingvojn”, kiel Esperanto kaj Interlingua, sed „ili ne ĝuas la saman vastan popularecon kaj subtenon” (t.e. kiel la angla).

Angla lingvo kaj rusa alfabeto... Ke Zamenhof ne jam havis tiun genian ideo! Jen vere la ovo de Kolumbo! La kioma jam sur la internacilingva tereno?

Efikoj de Connor-atako:

Heroldo-abonantaro en Usono kreskis je 30 procentoj.

Montrigis, ke la kalumnia atako de la ĝenerala sekretario de EANA kontraŭ nia redaktoro havis efikon neatenditan: la abonantaro de Heroldo en Usono estis la 1-an de junio 1953 je 30% pli alta ol antaŭ unu jaro. Krome, ĉiuj usonaj abonantoj pagis nunjare la normalan aŭ pli ol normalan kotizon, dum en 1952 pluraj ĝuis favoreprezon. Resume: s-vo Connor atingis per sia atako la malon de tio, kion li intencis.

Kio koncernas nian stampepan postulon pri ĝustigo de la kalumnioj, ĝis hodiaŭ ni ne ricevus respondon de EANA nek vidis ĝustigon en ĝia organo. Ni simple konstatast tiun ĉi fakton. Sen komento.

Ĉi tio estu averto por tiuj, kiuj deziras ke ni ataku iun homon aŭ grupon. Plejofte, atako estas nur senpaga reklamo por la atakato. *Niaj* laboroj estu ĉiam kaj ĉiel konstruaj, neniam detruaj.

Report of the Executive Committee

to the First Annual Congress of ELNA

Some seven months have elapsed since the time when the Esperanto League for North America elected an Executive Committee of eleven members, including the President and Vice-President, who are ex-officio members of the Committee. We were elected without precise directives as to how we were to function. Our action since have, therefore, been based solely on the directive given in Section 410 of our Constitution:

"They (the Executive Committee) shall supervise the entire functioning of the League, subject to the Constitution, and shall look after the interests of the League between Congresses."

Executive Committee members immediately began a lively interchange of ideas as to how we could best perform the duties assigned to us by the Constitution. It was agreed that, in spite of the tremendous handicap of having to conduct all business by correspondence, we did not want to take the easy way out, and leave the work and the responsibility to one or two persons. All Executive Committee members wanted to do their fair share of the work, and to accept their fair share of the responsibility in the making of decisions.

On motion by Committee Member Adams, the Executive Committee decided to elect a Chairman to coordinate the work of the entire Executive Committee, and to establish standing committees for the various fields of activity of the League.

F. R. Carlson of Seattle, Washington, was elected Chairman.

The following committees were established:

Organization and Membership: Robert Karlson, of Camden, N. J., and Armin Doneis, of Pharr, Texas; Finance: John Bovit, of Westfield, N. J., and Elvira Zetterlund, of Sacramento, Cal.; Publicity: D. B. Richardson, of Tacoma, Wash., and Helene Wolff, of San Francisco, Cal.; Education: W. G. Adams, of Kingston, Wash., and Prof. G. G. Iggers, of Little Rock, Ark.

These committees were given authority to associate with them in their work such other members of the League as they might desire. Organization on this basis was completed in March of this year.

The Executive Committee has approved the following:

1. A decision by the President that: "The Constitution as submitted to the members is the official copy relative to neutrality."

2. A set of Regulations (attached)

setting forth in detail the manner in which the Executive Committee shall carry out the responsibilities given to it by Section 410 of the Constitution.

3. A proposal that: "All decisions of the Executive Committee, except purely procedural decisions affecting only the functioning of the Executive Committee itself, shall be published to the members in Informiloj. If 25 or more members protest any such decision within 60 days after its publication, the action shall be referred to a referendum of the membership within 60 days of such protest. If the vote sustains the objection, the Executive Committee shall withdraw the protested decision. If the vote sustains the Executive Committee, or if the decision is not protested as stated above, the action of the Executive Committee shall stand as the action of the League."

4. The decision not to collect dues from Charter Members for the year 1953;

5. Mass subscription to British Esperantist for our members;

6. The choice of Madison, Wisconsin, and the dates July 2-5, inclusive, for our Congress; the tentative program for the Congress, as submitted by S-ano Glenn Turner for the Local Congress Committee, but with some minor changes;

7. Incorporation of the League;

8. Appointment of S-ano James D. Sayers as Editor of the North American Esperanto Review;

9. All expenditures made for the League before the Executive Committee was prepared to take up its proper function;

10. A proposal that all small printing jobs (letterheads, etc.) for the League should be done by Executive Committee Member Carlson, who has agreed to do this work free if the League provides the material on which the printing is to be done.

The Executive Committee postponed consideration of amendments to the Constitution until after the Madison Congress on the grounds that there was not time to give the matter the careful attention which it deserves. The Constitution (Section 702) requires that:

"Such proposal of amendments shall be published not less than 100 days before the subsequent Congress."

S-ano Sayers, Editor of the Review and active leader of the movement which resulted in establishment of ELNA, resigned from the post of Editor. The Executive Committee decided that, until we are able to establish a permanent policy

and choose a permanent Editor for the Review, Executive Committee Member Richardson, Chairman of the Publicity Committee, shall act as Editor, with assistance from other members of the Executive Committee.

The Committee aims at a democratic, decentralized grass-roots organization to build the Esperanto movement in North America.

Regulations of the Estraro

The Executive Committee (Estraro) of the Esperanto League for North America hereby establishes the following rules and procedures as a guide in its work for the advancement of the interests of Esperanto and the League:

1. The Estraro acts as the governing body of the League, in cooperation with the President and other officers of the League. The Estraro formulates the policies under which the League operates.

2. The Estraro audits the books of the financial officers of the League. It prepares as soon as possible after the annual election of officers a budget showing the estimated income and expenditures of the League for the ensuing year. It authorizes the expenditure of all sums greater than \$25.00.

3. The Estraro appoints the Editor of the official organ and guides its policies.

4. The Estraro studies the Constitution of the League and, guided by its studies and experiences in the working thereof, proposes amendments thereto.

5. The Estraro selects the place of the annual Congress and names the Chairman of the Local Congress Committee, who, subject to the approval of the Estraro, names the other members of his Committee, draws up a tentative program, which must be submitted in advance to the Estraro for its approval, and handles other necessary arrangements.

6. The Estraro from time to time adopts such other rules and procedures as its experience may show to be useful.

7. As soon as possible after the results of the annual election are known, the Estraro organizes by electing a Chairman.

8. The Chairman is the presiding officer of the Estraro. He receives suggestions of the individual members of the Estraro and passes them on for the opinions of the other members. He appoints the permanent and temporary committees. He acts as the liaison between the Estraro and the officers of the League. He arranges for voting on matters of importance.

(Continued on page 4)

Niaj Grupoj

Sub ĉi tiu titolo ni intencas en venontaj numeroj raporti la agadojn de lokaj grupoj. La redakcio petas vin alsendi detalojn pri *via* grupo regule, por ke ni povu informi niajn legantojn pri tio, kion vi faras.

Seattle.

The period of organizing the League for action is over. *Now for the action!*

Seattle kicked off on the new regional organization campaign by inviting all friends of Esperanto in Washington, Oregon, Idaho, Montana and British Columbia to a picnic at Lincoln Park in Seattle, on August 16.

In spite of short notice and threatening weather, 31 persons turned out to have fun and launch the organization. Talks by Jay Berry, President of the host Society, Dave Richardson, Editor of the Review, and Ferd Carlson, Chairman of the ELNA Executive Committee, were followed by a decision to form a Pacific Northwest Regional Federation. Jay Berry, of Seattle, by a one-vote majority over Raymond Eccles, of Buckley, was elected Secretary, and was instructed to arrange for formal organization. Communications, membership applications, contributions and addresses of possible recruits should be sent to: Seattle Esperanto Society, 2116 N. 35 St., Seattle 3, Washington.

Esperanto

en la Nordamerika Gazetaro

Ankaŭ ĉi tie ni bezonas vian kunlaboradon. Ne supozu, ke la redaktoro vidis ĉion pri Esperanto en la diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Ĉiu membro de ELNA estas help-redaktoro de la *Revuo*. Sendu eltondaĵojn el la lokaj ĵurnaloj kaj raportu la daton de la gravaj naciaj gazetoj, en kiuj aperis artikoloj pri Esperanto.

Correspondence Course

The Educational Committee announces that arrangements have been made to provide the Elementary Correspondence Course of the British Esperanto Society for the use of beginners who are unable to avail themselves of class instruction.

This course is the best of all such courses and we are proud to be able to offer it to our members. The complete course costs only \$4.50 and includes copies of Szilag's Practical Course in Esperanto, the Edinburgh Dictionary, etc. The instructor in charge of these courses will be that very competent Esperantist, our Secretary, Louis Dormont, 123 East 35th Street,

(Continued from page 3)

9. The permanent committees are: Financial, Membership and Organization, Publicity, and Educational.

10. The Financial Committee supervises the auditing and budgeting of the funds of the League and submits its recommendations to the Estraro for approval. It works to secure funds to carry on the work of the League through donations, etc.

11. The Membership and Organization Committee works to secure new members and to assist in the work of organizing local groups and classes and regional organizations.

12. The Publicity Committee works to secure advantageous publicity for Esperanto and the League through newspapers, magazines, public addresses, etc. It prepares publicity leaflets, pamphlets, etc.

13. The Educational Committee is charged with seeing that useful textbooks and literature are available to members and the public through Esperantist and other book dealers, with acquainting the members with the literature of Esperanto, and with encouraging members to subscribe to Esperanto magazines of general interest. It assists the Editor in the preparation of the official organ of the League. It encourages the publication of new textbooks and literature. It arranges courses of instruction by mail and issues diplomas. It assists and advises teachers of Esperanto classes.

14. The President of the League and the Chairman of the Estraro are *ex-officio* members of all committees.

15. In case of a vacancy among its members or the officers of the League, the Estraro names a suitable person to fill the vacancy until the next annual election of officers.

16. The Estraro submits an annual report to the Congress on the work done during the past year and its plans for the future.

17. The Chairmen of Committees report at regular intervals to the Estraro through the Estraro Chairman.

Brooklyn 3, New York. If sufficient interest develops, advanced courses will be offered. Corrected lessons will be returned by air mail, thereby shortening the time necessary to complete the course.

This is a labor of love on the part of S-ano Dormont, who announces that any receipts over and above the actual cost of the course will be used to aid the work of the League.

The Educational Committee has other projects in view, which will be announced from time to time in these columns.

Notes From the Estraro

We regretfully report that S-ino Elvira Zetterlund, of Sacramento, resigned from the Executive Committee, due to protracted illness. The Executive Committee has named S-ano George E. Wagner, 403 E. North St., Tampa, Florida, to fill out the unexpired term.

Keep these addresses:

Committee on Organization:

Armin F. Doneis

Box 105

Pharr, Texas.

Committee on Publicity:

D.B. Richardson

6205 South Prospect

Tacoma, Washington.

Committee on Education:

W.G. Adams

Kingston, Washington.

Committee on Finance:

John Bovit

132 East Broad Street

Westfield, New Jersey.

Executive Committee Chairman:

F.R. Carlson

2116 North 35th Street

Seattle 3, Washington.

For help in organizing local or regional groups, call on the Committee on Organization. Send this committee names and addresses of all Esperanto groups, but *you* do your part to activate them.

For help in publicity work, call on the Publicity Committee. Send to this committee names and addresses of your local newspapers, but *you* keep them supplied with Letters to the Editor, news of Esperanto, etc. Send the committee properly labeled and dated photographs of active Esperantists and Esperanto affairs, clippings from newspapers, etc.

For help on instruction, organization of courses, call on the Committee on Education. Notify this committee of all classes established, number of students, textbook used, name of instructor, etc.

Help!

As you can see, the committees of the Estraro have a lot of work to do.

Can you help?

If you want to help, particularly if you have available equipment, such as amateur printing setup, mimeograph, multigraph, etc., notify Chairman Carlson.

Call on all friends of Esperanto in your region (you can get lists of addresses from the Secretary or the Organization Committee) to join in local and regional organizations to promote Esperanto.

Me + You x Teamwork = Success.

NOVA JARO — NOVA PROGRAMO

La Estraro de ELNA salutas ĉiujn kunlaborantojn, komence de la nova jaro de Liga laborado.

La pasintaj monatoj okupiĝis per pretiĝado por la laboroj de la Ligo, per decidoj pri fundamentaj politikoj kaj per planado. Post la unua Kongreso, ni havas la planon kaj la politikon, kaj devos estonte okupi nin per la planita laboro.

La programo por la Ligo, starigita de la Estraro kaj aprobita de la Kongreso, bazas sin sur la jenaj principoj:

1. Ni starigu tute demokratian "herbradikan" amasmovadon, kies celo estos ĝenerala bonvolo kaj subteno al nia afero ĉe la amerika publiko.

2. Nia laboro estu konstrua, niel detrua. Ni ne malŝparu niajn fortojn per batalado kontraŭ iu homo, aŭ iu grupo. Ni uzu niajn tutajn fortojn por starigi ĝeneralan aprobon al la lingvo Esperanto. Ni kunlaboru kun iu ajn, kiu laboros tiucele.

El tiuj principoj kreskis la programo, kiun ni prezentas por gvidi la laborojn de la Ligo:

1. Ĉiun decidon de la Estraro, kaj ĉiun decidon de la Kongreso, ni devos referendumi, se sufiĉa nombro da membroj protestos.

2. La laborado ne estu laborado de iu funkciulo en centra oficejo, nek de malgranda grupo de elektitaj gvidantoj, sed plejparte ĝi estu laborado de regionaj grupoj. La Estraro kaj la aliaj funkciuloj helpos, sed la membroj mem prenu al si la iniciativon por interkontaktiĝi kaj starigi grupojn lokajn, ŝtatajn (aŭ provincajn), aŭ kelkŝtatajn (kelkprovincajn). Iu ajn membro rajtas ricevi de la Sekretario, aŭ de la Estraro, adresaron de konataj amikoj de nia afero en iu ajn regiono por starigi la interkontakton kaj kunlaboradon. Ni petas, ke vi tuj petu kaj uzu tiujn listojn. Ni petas ankaŭ, ke vi sendu al la Sekretario pluan adresojn de amikoj de Esperanto.

3. La Estraro ne deziras starigi rigidaĵajn regulojn por la regionaj grupoj, sed ni volas konsili al vi, ke vi ne estu tro ĵaluzaj aŭ izolemaj pri la grupoj. Se membro de alia organizaĵo, aŭ iu, kiu ne volas membriĝi en iu ajn tutlanda grupo, volos kunlabori por Esperanto, akceptu ties helpon. Ni esperu, ke ili poste aliĝos al la Ligo.

4. Kvankam ni deziras, ke multaj homoj aliĝu al la Ligo, ni devos emfazi subtenon al Esperanto, anstataŭ membrecon en la Ligo aŭ lernadon de la lingvo. Ni instruu tiujn, kiuj dezirus lerni, ni invitu ĉiujn esti Liganoj, sed ni ne fortimigu eblajn helpantojn per trda insistado pri membreco aŭ lernado.

Vizito al Zamenhof-Monumento en Worgl

Kiam Samideanoj Alois Knapp kaj D-ro. Ilsley Boone flugis al Eŭropo pasintan someron por ĉeesti la tutmondan naturistan kongreson en Svisujo, ili samtempe intencis viziti la Zamenhof-monumenton en Worgl, Aŭstrio. Kaj tiu vizito superis iliajn plej altajn atendojn! Tie, meze de la Tirolaj Alpoj, en la koro de la Aŭstria urbo Worgl, staras impona blankmarmora busto de la majstro, eble la plej bela en la tuta mondo. Sur la soklo el Tirola granito estas fiksita memortabulo kun enskribo:

DR. L.L.ZAMENHOF, kiu donacis al la homaro ESPERANTON. 1859—1917.

Tiel, la urbo Worgl donas sekvidan ekzemplon, kiel digne honorigi la majstron. Dank' al kunlaboro de sinceraj Esperantistoj kaj registaro: la samideanoj Hugo Steiner kaj Hans Steiner, la kanceliero D-ro L. Figl (mem fervora Esperantisto), la urbestro S-ro Pichler, kaj la skulptisto S-ano Theodor Ohnesorge, la monturbo Worgl posedas altvaloran trezoron. Veran esperantan animon posedas ankaŭ la skulptinto, kiu ideale kaj donace verkis la buston por ke la tuta Esperantistaro—ne, la tuta mondo—posedu dankesprimon al D-ro L. L. Zamenhof.



foto: Max Porsche

de dekstre:

- pastro Ludwig Thalmaier, predikanto kaj festparolanto,
- distriktestro D-ro Riccabona,
- fahstestrino Helena Hieselsteiner,
- prelato Hieronymus Trendl, abato de monaĥejo Wilten,
- hort. kons. Hugo Steiner, honorprezidanto,
- iniciatinto Hans Steiner, unua prezidanto,
- Theodor Ohnesorge, skulptisto de la Zamenhof-busto,
- Landestro de Tirol, Josef Anton Mayr,
- (blankharulo) prezidanto de Tirola Parlamento, urbestro de Wörgl, Komerca kons.
- Martin Pichler,
- F-ino Therese Kainer, urba oficistino,
- S-ro Franz Feiersinger,
- S-ro Hans Jakob, Estrarano de U.E.A., Redaktoro de "Esperanto",
- S-ro Emilien Provoost, ĉefo de la francaj trupoj de Kitzbühel,
- Raimund Cech, afergvidanta prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio.

5. Ĉar Unesko nun konsideras la problemon de internacia lingvo, kaj intencas pridecidi ĝin en 1954, nia aktiveco estu plejparte celata al subteno por la Petskribo. Skribu al viaj Senatanoj, Kongresanoj, al la Prezidanto, al la Departemento de Ŝtato, por peti ke nia registaro subtenu la peton por instruado de Esperanto en la lernejoj en ĉiuj landoj. Instigu viajn gekonatojn fari same. Propagandu ĉiamaniere pri la Petskribo kaj pri la neceso ke Unesko donu

decidon favoran al nia peto.

Tiu, kiu "ne havas tempon por ĉeesti klasojn", tamen povos multe helpi pri tia programo. Ni starigu vere "herbradikan" amasmovadon por subteni Esperanton. Jen la programo, kiun ni rekomendas al vi. Ni esperas ke vi ĉiuj aprobos kaj vigne kunlaboros.

F.R. Carlson, Estrarestro.


ROSARIO

"PARDONU, Sinjoro, sed ĉi tie oni ne permesas fumi." Johano turnis sin kaj rigardis al la bluestita stevardo, ne kompreninte. "Oni ne fumu sur la motorferdeko, Sinjoro."

Johano kapgestis, forjetis la cigaredon al la saŭmanta akvo. Ĝi restis videbla momenton, ŝajne senmova sur la akvomonteto. Tiam la akvo glitis suben en valetan, kaj la cigaredo-malaperis sub la saŭmo. Li iris al la ŝtuparo kaj supreniĝis al la pasaĝera salono. Ekstere, la suno brilis sur la markolon Puget, kies enlandaj akvoj boletis milde inter la multegaj verdaj insuletoj. Tie kaj tie malgrandaj fiŝbarkoj aŭ jaktetoj kun ekskursantoj vidigis. Unu ekskursanta barketo venis proksimen al la pramsipo *Rosario*, kaj kvar gejunuloj salutis, gestante per manoj kaj poŝtukoj. Sur la *Rosario* turistoj en bonkvalitaj vestaĵoj umadis per fotografaj iloj. Aliaj pasaĝeroj, ne rimarkante la eksterajn vidaĵojn, sidis silente, enuigitaj. La plejparto de ĉi tiuj estis insulanoj, kiuj ensipiĝis en Anacortes por reveni al siaj hejmoj en Orcas, aŭ Shaw, aŭ Friday Harbor. Multaj el ili estis same laboriste vestitaj kiel Johano, kun dikaj ĉemizoj el plurkolora lano, kaj kun trouzitaj pantalonoj.

Johano prenis seĝon ĉe la servotabulo de la ŝipa restoracio. Li mendis kafon, kaj bruligis cigaredon. Ĉi tiun fojon! li promesis al si. Ĉi tiun fojon mi faros tion, kion mi devus esti farinta jam antaŭ du jaroj.

Du jaroj . . . Tiam, sur ĉi tiu pramsipo, li konatiĝis kun ŝi, kaj dum unu horo ili estis kune. Nur unu horon, sed en lia imago li vidis ŝin ankoraŭ, juna, bela, ridetanta al li. "Kiel vi nomiĝas?" ŝi estis demandinta, kaj li respondis embarasite "Johano Redway," embarasita pro la apudeco de ĉi tiu knabino. Estis nebulo tiam, densa nebulo, kaj la pramsipo navigaciis "per la fajfilo," kiel diras la ŝipestro, fajfigante kaj sciante per la ĉoj la precizan lokon de la ŝipo. Li pensis longe pri tiu tempo, kiel stulte li parolis al ŝi, li ne povis kulpigi ŝin pri tio, ke ŝi ne respondis al liaj leteroj. Tamen, nun, li metos la aferon en la ĝustan ordon. Li ja multfoje ripetis al ŝi la vortojn, kiujn li diros al ŝi ĉi tiun fojon. Kuraĝe, kun plena posedo de la emocio, li konigos al ŝi sian amon. Mario, li diros, mi estis stulta naivulo, estis mia kulpo tio, kio okazis. Sed mi pensis nur pri vi dum du longaj jaroj, kaj mi devis, mi devis veni al vi. Mi amas vin, Mario, nur vin. Sen vi mi



ne povos, mi ne volas vivi. Kaj tiam ŝi, Mario, estos la vico al ŝi kaj ŝi diros, Johano, Johano, vi venis, mi scias, ke vi venos. Johano, mi amas vin . . .

La cigaredo brulis kontraŭ liaj fingroj. Li estingis ĝin en la kafe, kiu estis ŝprucinta en la subtason.

Komenciĝis ioma movado inter la pasaĝeroj, kaj Johano konstatis, ke oni estas aldokigonta en Orcas. Li ekstaris, pensante ke duono de la veturo jam pasis, kaj rigardis el la fenestro. Sur la motorferdeko sube, la ŝipistoj forprenis la barilan ĉenon de la pruo kaj automobilaj motoroj ekfunkciis dum la doko pli kaj pli proksimiĝis. La pruo tuŝis fostaron de la flanko de la doka alirejo, kaj tiel gvidiĝis ĝuste sub la dokofino. Ŝipestro saltis supren al turnlevilo sur la doko, kaj mallevigis la finon de la pasponto al la ferdeko. Tri aŭ kvar automobiloj kaj pluraj piedirantoj alboridiĝis. Eksonis fajfeto kaj la pramsipo estis preta remaĝi for de la doko. Johano prenis novan cigaredon kaj bruligis ĝin.

Forprenante la alumeton, Johano vidis la malbelan cikatron sur lia mano, ankaŭ la malplenon inter la dua kaj kvara fingroj. Li grimacis, subite pensante pri la seĝejo, kie li, ŝvitante, penegante, pecigis la gigantajn abiajn trunkojn; pri la

La redakcio invitas ĉiujn nordamerikajn aŭtorojn alsendi siajn literaturajn kontribuojn.

akcidento, kiam li, kiel ĉiam profundiganta en siaj pensoj, ne retiris sufiĉe rapide la manon for de la maŝinaro. Li eĉ ne rimarkis la elsprucantan ruĝaĵon, nek la doloron, ĝis pasis jam kelkaj sekundoj kaj kunlaboranto kaptis lian brakon por preni lin for. Ankaŭ tiam li pensis, nur pri Mario, pri ŝi, tiel bela kaj juna.

Mario . . . Ili staris tie, en la koridoro de la salono, penante vidi ion en la nebulo ekster la fenestro. Li tusetis, proponis al ŝi cigaredon, kaj ŝi diris, "Dankon, mi ne fumas," kaj li mem ekfumis, nesciante, kion diri. Tiam kaj tiam ŝi rigardis al li kun stranga miemo, kvazaŭ ŝi atendas iun certan vorton de li. Stranga estas la sorto, vere stranga. Dum jaroj kaj jaroj oni atendas, ĝis oni trovas certan personon, iun, kiun oni devas ofte en revoj, sed neniam vidas en la

realo, ĝis subite, en tiu momento kiam oni ne atendas tion, tiu persono estas tie. Kaj la ŝanco prezentas sin, sed oni estas surprizita, kaj embarasita, kaj oni ne scias kion fari, kion diri, kaj oni lasas eskapi la ŝancon. "Ĉu vi loĝas en la insuloj?" ŝi diris, kaj li respondis, "Ne, mi nur libertempas". Post paŭzo, sufiĉe longa por ke la nebula fajfilo sonis eble tri fojojn, li diris, "Ĉu vi loĝas en la insuloj?" kaj ŝi respondis, "Jes," kaj post tio li proponis ke ili trinku kafon, ĉar li ne sciis ion alian por diri. Li sciis, ke post ne longe, ili forlasos la pramsipon. Li devas, li devas diri ion, por ne perdi ĉi-tiun ŝancon, kiun la sorto fine, finfine, portis al li. Sed la vortoj ne venis, ĝis la knabino rigardis subite en lian vizaĝon, kaj diris, "Vi estas stranga homo. Ĉu vi ne scias konversacii kun knabino? Aŭ eble la knabinoj ne plaĉas al vi?" La saugo kuris al lia kapo, li balbutis, "Jes, jes, ili plaĉas al mi, mi volas diri - vi plaĉas al mi tre multe, kaj - kaj" li haltis pro la embaraso, kaj ŝi ridis al li. Ridis al li! Tamen, ne estis ŝia kulpo, la kulpo estis lia, ĉar li estis tia stultulo, ke li ne sciis kion diri al ŝi. Sed ĉi tiun fojon, li ne estos tiel stulta. Liiros al ŝi, tie en la vendejo, kie ŝi laboras, kaj li diros al ŝi, Mario, mi estis stulta naivulo, sed mi amas vin, vin, Mario, mi amas vin . . .

Li vidis, ke lia cigaredo ne plu brulas. Li prenis novan, bruligis ĝin, kaj rigardis al ŝia horloĝeto. Post kelkaj minutoj oni alvenos. Post kelkaj minutoj li vidos ŝin. Johano, ŝi diros, vi venis, vi venis . . .

La ŝipo naĝis preter terfingro, kaj subite la dokaro estis videbla. Eble kvin minutojn nun. Kun aliaj pasaĝeroj Johano iris al la ŝtuparo, malsupreniris al la motorferdeko. La suno brilis forte, sed elektra lampo funkciadis senbezone. Pasintan fojon, ili staris sub tiu lampo en la nebulo, ĵus antaŭ la alboridiĝo, kaj li sentis la bezonon diri ion, kaj li diris, "Ĉu mi povas skribi al vi?" kaj ŝi ridis, kaj diris, "Nu, kion vi skribus al mi?" Li hontis, ĉar li konstatis, ke ŝi estas prava. Li ja estas fuŝulo, li neniam havis talenton pri vortoj. Ŝi diris, "Ne, mia kara, korespondado estas sencela, ĉar ni ne vidas unu la alian denove." Sed ŝi nur duone pravis pri tio, ĉar la sekvintan tagon, Johano kaŝe vidis ŝin dum ŝi eniris la vendejon en la ĉefa strato por la deĵorado. Li vidis la ŝildon super la vendejo: Morton's Store, Manĝaĵoj kaj Generalaj Varoj. Poste li skribis, multajn fojojn, al Mario Thompson, ĉe Morton's Store, sed respondon li neniam ricevis.

La pasponto frapis kontraŭ la pruo, kaj Johano konstatis, ke oni alvenis al la doko. Li rigardis la horloĝeton. Iom post la tria, bone, nur kelkajn minutojn nun . . .

EVANGĚLINO

Sur la doko, Johano sentis la embarason kreski, la koro ektamburis. Ne, ne, Johano mia, li pensis agite, ĉi tiun fojon ne, oni regu sin, oni paŝu fiere, kaj oni memoru la vortojn. Li haltis, por kolekti la kapablojn nur, eble fumi nur unu cigaredon, estas bela tago, oni ne devas rapidi pri tia afero. Svito ekaperis sur la frunto, kaj li forviŝis ĝin per ĉifita manumo, erante la fumon rapide kaj nervo. Li cirkaŭrigardis, kaj vidis, ke neniu rimarkas lin. Enspiregante profunde, li forĵetis la cigaredofinon kaj iris per rapidaj paŝoj laŭ la ĉefa strato.

Li venis al la pordo de la ĝenerala vendejo, malfermis ĝin, kaj eniris. En la vendejo vidigis kelkaj insularoj starantaj apud la vendotablo, rigardantaj al la diversaj varoj—konservitaj manĝaĵoj, freŝaj legomoj kaj fruktoj, la malfermaj kestoj kun terpomoj. Sentante la ruĝon supreniri al la vizaĝo, li iris du paŝojn al flanko, de kie li povis vidi la du vendistinojn. Nur el angulo de unu okulo li kaptis ekvidon de virino, simple vestita, kun longaj malbone frizitaj nigraj haroj. Ŝi estis iomete dika, la trajtoj havis tute ordinaran aspekton; kaj ŝi ne rimarkis Johanon.

Li forprenis la rigardon. Ne, nun ne estas konvene. Tro multe da homoj ĉi tie nun. Oni atendu momenton, elektu la ĝustan tempon. Nerve, Johano turnis sin al montraĵo de konservitaj supoj. La supoj, zorge aranĝitaj en piramido, havis ĉiu la saman etiketon. Liaj vangoj brulis pro troa sango, kaj lia kapo ekdoloris. Nu, oni devas ludi la ĝustajn kartojn nun. Li turnis la vizaĝon al la vendotablo—jen ŝi—nun oni faru la paŝon! kaj li iris al ŝi.

“Jes?” En ŝia parolo ne estis signo de rekono. Certe ŝi memoras min! Kial ŝi rigardas al mi, sen ia esprimo? Kial ŝi ne diras, Johano, vi venis al mi, mi ĉiam sciis, ke vi venos al mi.

“Jes?” ŝi ripetis.
“Mi vo—” Lia voĉo ne sukcesis aŭdebligi la vorton. Li tusetis. “Mi volas aĉeti pakajondecigaredoj.”

Mario turnis sin al montrobreto.
“Kiajn?”

“Ne gravas. Chesterfield.”

Johano metis la manon en la poŝon, eliris monaĵon kaj metis ĝin sur la tablon. Li ne relevis la okulojn, sed prenis la monerojn, kiujn la virino ĵetis antaŭ li, kaj la cigaredojn. Li respondis per duongesto de la kapo la sentonan “Dankon” de la vendistino, kaj forturnis en plena embaraso al la pordo.

Johano paŝis denove en la sunlumon, lezitis la stratarando, kaj bruligis cigaredon.

D.B. Richardson
El “*Esperanto Internacia*”

Jen la arbaro pratempa, la murmurantaj pinarboj Staras en verdaj vestaĵoj, en la krepusko malluma, Kiel Druidoj antikvaj, voĉoj malĝojaj, profetaj, Kiel harpistoj blankharaj, longaj la barboj sur brusto. De la kaverno profundaj la oceano najbara Raŭka per voĉo respondas, de la arbaro ĝemadon.

Jen la arbaro pratempa. Kie nun estas la koroj Kiuj sub ĝia branĉaro kiel cervido eksaltis, Kiu sub arbo ekaŭdas de la ĉasanto la voĉon? Kie vilaĝo humila, hejmo de la kamparanoj, Homoj de kiuj la vivoj kiel rivero iradis, Kies trankvilaj fluadoj pasas tra paca arbaro, Sub la branĉaro de l' tero, ankaŭ sub bildoj ĉielaj?

Estas dezerta la lando, kaj disigitaj por ĉiam Ĝiaj antaŭaj loĝantoj, for de la hejmoj peltitaj, Kiel folioj kaj polvo kiam la fortaj ventegoj De la kolera oktobro ilin ekkaptas kaj ĉasas, Kaj malproksimen portinte, sur oceanon disĵetas. Nur tradicio nun restas de la vilaĝo de Grand-Pre.

Se vi la kredon posedas, kredon pri amo konstanta, Kiu esperas kaj daŭras, kaj pacienco atendas, Se vi la fidon posedas pri la beleco kaj forto De la virina animo, koro fidela, amanta, Aŭdu la kanton malĝojan, kiun ankoraŭ kantadas De la arbaro la pinoj, la historion de amo En Akadio la bela, lando de homoj feliĉaj.

ESPERANTO TUTMONDE

Britujo

Proksimume 250 gesamideanoj ĉeestis la 37an Britan Esperanto-Kongreson, kiu okazis en Bournemouth je Pentekosto.

Grekujo

De nia nelacigebla piopiro D-ro Anakreon Stamatiadis ni ricevis multlongan raporton pri siaj kursoj oficialaj dum la lerneja jaro 1952-1953.

Li instruis en 14 ŝtataj gimnazioj, en komerca lernejo, en pedagogia akademio, en alternejo de ekonomiaj kaj komercaj sciencoj, kaj en alternejo por ŝtataj ĝeinstruistoj, entute al 1244 personoj. Li raportis, ke la intereso de la lernantoj pri Esperanto estas multe pli bona ol iam antaŭe.

Italujo

La mondkonata kudromaŝina fabriko Necchi produktinte modifitajn formojn de siaj maŝinoj B.F. kaj B.U. oficiale nomis ilin “B.F. Nova” kaj “B.U. Nova”. Plue, ĉe la foiro de Milano aperos plej lasta formo “B.U. Mira”. Gratulojn pro ĉi tiu utiligo de Esperanto oni sendu al Fabriko de Kudromaŝinoj Vittorio Necchi, Pavia, Italujo.

Jugoslavujo

Dum la tagoj de la 4a ĝis la 6a de Majo 1953 restadis en Maribor, nordorienta Slovenio, la K.K.S. S-ro Mason Stuttard, kiu faris propagandan rondvojaĝon tra jugoslavaj urboj. La urbestro solene akceptis lin, ankaŭ gvidantaj aŭtoritatuloj de kulturo kaj klerigo, kaj lokaj ĵurnalistoj intervjuis lin kaj lian edzinon. En la Kleriga Klubo de Laboristoj S-ro Stuttard prelegis pri UEA, universalfaj kongresoj, pri la movado en unuopaj landoj, kaj pri la signifo kaj celo de Esperanto kiel lingvo por ĉiu popolo. La prelegoj multe interesis kaj la vizito ĉiel sukcesis.

OPTIMISTO kaj PESIMISTO

Optimisto rigardaseksteren en la mateno. Pluvas. Li diras al si: “Sendube la pluvo baldaŭ ĉesos. Mi ne devos porti mian pluvaŭmbrelon.”

Pesimisto rigardas eksteren en la mateno. Suno brilas. Li diras al si: “Sendube pluvo. Mi devos porti mian pluvaŭmbrelon.”

Read Time magazine, July 27, 1953, on “How to Be *Amika*”.

ESPERANTO AT A GLANCE

The Alphabet: A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I
 ah bo tso cho do eh fo go joe ho hho ee
 J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T
 yo zho ko lo mo no oh po ro so sho toe
 U Ŭ V Z
 oo wo vo zo
 There is no Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have the vowel sounds of: bar, bear, beer, bore, boor.
 C is sounded like *ts* in *tsar*.
 J has the sound of *y* in *yes*.

Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ, and Ŭ have the sounds heard in: leech, liege, loch,
 leisure, leash, and leeway.

ESPERANTO is PHONETIC.

All letters are sounded—One letter, one sound.

Accent falls on the next-to-last syllable.

No irregularities.—No exceptions.

The Grammar is based upon Sixteen Fundamental Rules, which
 have no exceptions.

The Parts of Speech are formed from Root Words by addition
 of distinguishing letters.

○ is the ending of the Noun. Adjectives end in **A**
fakto piano evidenta granda

Plural is formed by adding **J** to Nouns and Adjectives.

evidentaj faktoj grandaj pianoj

Aj, oj sound as in: *my boy*.

The simple Verb has only six inflections.

Infinitive Present Past Future Conditional Imperative

I AS IS OS US U
helpi helpas helpis helpos helpus helpu

N marks the accusative (direct object). Adverbs end in **E**
Mi helpas lin I help him. diligente
Li helpas lin He helps me. energie

Esperanto League's Book Service

(The following list of books available to the readers of this magazine compose but a small portion of the several hundred titles, both textbooks and general literature (translations and originals) held in stock and listed on the latest mimeographed form which will be sent free on request. Address all requests and book orders to: Glenn P. Turner, ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE, Middleton, Wisc.).

TEXTBOOKS

Esperanto for Beginners,
 by Montagu C. Butler 1.10
 Robbie's Home Student
 (Recommended for quick course) .25
 Nelson's Esperanto Course
 (Recommended for long course) 1.50
 Step by Step in Esperanto
 Butler. (Very good) 1.50
 Esp. Grammar and Commentary
 by Cox. (Very good) 1.50

The leaflets shown here in slightly reduced size will soon be available for general distribution at 200 for \$1.00. If specified in your order, name and address of local group will be printed on leaflet at no extra cost. If not so specified, this space will be left blank. Quicker delivery with address not printed. Send orders, cash in advance, to: F.R. Carlson, 2116 North 35 St., Seattle 3, Washington.

DICTIONARIES

English - Esperanto Vocabulary
 (Not Exhaustive) 1.10
 English - Esperanto Keys
 5 or more, each05
 Millidge Esperanto - English
 Dictionary 2.60
 English - Esperanto Dictionary
 (Fulcher & Long) 2.35
 Edinburgh Esp. - Eng. - Eng. - Esp.
 Pocket Dict., highly recommended
 as a handy, dependable
 quick reference85
 Plena Vortaro. (Complete,
 all-Esperanto Dictionary) 4.00
ESPERANTO READERS
 (For primary - advanced practice)
 Unua Legolibro50

Esperanta Legolibro, by Setala60
 Ilustritaj Rakontetoj, by Kenngett25

GENERAL LITERATURE

La Sankta Biblio. (Paper-bound) 1.75
 La Sankta Biblio. (Leather-bound) 4.50
 Antonio kaj Klcopatro65
 Romeo kaj Julieto65
 Princino de Marso. Burroughs35
 Sep Fratoj. (Great Finnish novel
 by A. Kivi) 3.00
 Sveda Antologio. (2 volumes) 3.75
 Invito al Cielo. (Original Esp. novel.
 James D. Sayers) 1.25
 Historio de Kristo. (by Papini.
 Paper-bound) 1.40

EASY. The vocabulary consists mainly of word roots common to most European languages.

SIMPLE. See other side.

PRACTICAL. At yearly Congresses, 2000 to 3000 Esperantists from many countries conduct all business in Esperanto.

EUPHONIOUS. Linguists have stated that Esperanto, with its rich vowel sounds, is one of the most euphonious of languages.

RATIONAL. Working with Esperanto is a joy to one who loves logical expression of ideas.

AND in spite of its simplicity, experts in Esperanto use it for the most technical treatises or the highest flights of poetic fancy.

NEUTRAL. No nation need feel that it is giving an advantage to another nation by promoting the neutral language, Esperanto.

TOO much of the world's striving for peace is wasted because we cannot understand one another.

ONE LANGUAGE FOR ALL, the Englishman, the Frenchman, the German, the Japanese. Let there be understanding among men!

895,342 individuals and organizations with a total membership of 15,454,780 have petitioned the United Nations for recognition of Esperanto as the Second Language for All Nations. Among the petitioners were many leading scientists, churchmen, heads of state, Prime Ministers and Ministers of Education in many lands. The nations, members of the United Nations, will give their decision at Montevideo in 1954. *Do your part to see that our Government supports the petition!*

For further information, write to:

Esperanto League for North America

123 East 35th Street

Brooklyn 3, N.Y.

You are cordially invited to visit your local Esperanto group:

SEATTLE ESPERANTO SOCIETY

Meetings every Wednesday, 8:30 p.m.

2116 North 35th Street

Phone DEXter 3256

Presejo Esperantista de Seattle